


LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Grafdijk (N.H.)
Nederlando.
Gironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

LA VIRO EL HEDE.

Antaŭ longa tempo la lupoj atakis iun viron, kiu eliris vendi lignon por bareloj. Li venis el Hede, vilaĝo kuŝanta en rivervalo.

Estis vintro kaj la lupoj persekutis lin, kiam li veturis sur la glacio de la lago. Estis naŭ aŭ dek lupoj, kaj la viro el Hede havis nebonan ĉevalon; pro tio li ne havis multan esperon elsavi sin.

Kiam la viro aŭdis la lupoblekadon kaj vidis, kiomope ili estas, li tute perdis sian trankvilecon kaj ne pripensis, ke li povus forĵeti la barelojn kaj kuvojn por malpezigi la ŝarĝon.

Li daŭre batis la ĉevalon, kaj ĝi kuris jam tiom rapide kiom eble, sed tamen la viro rimarkis, ke la lupoj venis pli proksime. La lagobordoj estis forlasitaj, kaj la plej proksima farmdomo estis ankoraŭ kelkajn mejlojn for. Li atendis nenion alian, ol ke lia lasta horo venas kaj sentis, ke li pro timo rigidiĝas. Sidante kvazaŭ paralizite en la sledo li vidis, ke io sin movas inter la pinobranĉoj, kiuj estis dismetitaj en la glacieron por montri la vojon. Kaj vidante, kiu iras, li ankoraŭ pli ektimis ol komence.

Ne estis lupoj, kiuj venis renkonte al li, sed malriĉa maljunulino. Ŝi nomiĝis Tsinn Malin kaj kutimis ofte vagi sur vojoj kaj vojetoj. Ŝi estis iom lama kaj ĝiba, tiel ke jam de malproksime oni ŝin povis rekoni.

La maljuna virino iris rekte al la lupoj kaj la viro el Hede komprenis tuj, ke, se li sen averto ŝin preterveturos, ŝi ĝuste iros al la faŭko de la sovaĝaj bestoj. Kaj dum ili ŝin disŝiros, li povos elsaviĝi.

Malrapide ŝi iris, klinite super bastono. Estis klare, ke ŝi estas

perdita, se li ne helpas ŝin. Sed eĉ, se li haltas, kaj kunprenas ŝin en la sledo, ankoraŭ ne estas certe, ke ŝi estas savita. Se li enirigas ŝin en la sledon, verŝajne la lupoj atingos ilin, kaj ŝi kaj li kaj la ĉevalo estos mortigataj. Kaj li pensis, ĉu ne estos pli bone oferi unu vivon por savi du aliajn.

Ĉio ĉi fulmis tra lia kapo, kiam li vidis la maljunulinon. Kaj krome li pripensis, ĉu poste li pentos ke li ne helpis la virinon, aŭ ĉu la homoj scios, ke li renkontis ŝin kaj ne defendis.

Estis terura tento, kiu lin ĝenis.

„Mi dezirus, ke mi ne renkontis ŝin,” li pensis.

Sammomente la lupoj sovaĝe ekblekis. La ĉevalo forsaltis kaj preterkuris la maljunulinon. Ankaŭ ŝi jam aŭdis la lupoblekadon kaj kiam la viro el Hede ŝin preterveturis, li vidis, ke ŝi komprenas sian sorton. Ŝi haltis, kun malfermita buŝo kvazaŭ ekkrionta, la brakoj etenditaj, petantaj helpon, sed ŝi ne kriis, nek provis kapti la sledon. Certe okazis io, kio ŝin ŝtonigis.

„Tio estis sendube mia apero. Certe mi aspektis kiel fantomo, kiam mi preterflugis ŝin,” li pensis.

Li provis esti gaja pro sia saviĝo. Sed samtempe io komencis bruli kaj ektiri en lia brusto. Neniam li faris ion malbonan, kaj nun li opiniis, ke lia tuta vivo estas detruita.

„Ne, okazu kio ajn,” li diris, retenante la bridojn, „sed mi ne povas lasi ŝin sola kontraŭ la lupoj.”

Kun plej granda streĉo li haltigis la ĉevalon, finfine li sukcesis kaj rapidege li reveturis al la maljunulino.

„Envenu rapide,” li diris krude, ĉar li koleris pri si mem, pro tio ke li komence la virinon forlasis.

„Ĉu vi do neniam povas resti hejme, virinaĉo,” li diris. „Nun mia ĉevaleto kaj mi devas suferi pro vi.”

La virino respondis per nenio, sed la viro el Hede ne deziris indulgi ŝin. „Mia ĉevalo kuris hodiaŭ jam kvin mejlojn, do vi povas kompreni, ke ĝi baldaŭ laciĝos kaj la ŝarĝo fariĝis ne pli malpeza, post kiam vi alvenis.”

La glitiloj sub la sledo knaris sur la glacio, sed tamen li aŭdis la spiregadon de la lupoj, kaj li komprenis, ke la lupoj lin atingis. „Nun venas nia fino,” li diris. „Estis nek por vi, nek por mi feliĉo, ke mi provis savi vin.”

Ĝis nun la maljunulino silentadis, kiel iu, kiu kutimas aŭdi malĝentilaĵojn. Nun ŝi diris kelkajn vortojn: „Mi ne komprenas, ke vi ne forĵetas la lignaĵon por malpezigi la ŝarĝon. Morgaŭ vi povas reveni kaj alporti ĝin.”

La viro komprenis, ke tio estas bona konsilo kaj li miris, ke li mem ne elpensis tion. Li donis la bridojn al la maljunulino, malligis la ŝnuron de la daŭboj kaj ĵetis ĉion for de la sledo. La lupoj estis tuj post ili. Sed nun la bestoj haltis por rigardi, kio falas sur la glacieron kaj la vojaĝantoj sukcesis akiri antaŭecon je ili.

„Se ne helpos, vi komprenas, ke mi donos min mem al la lupoj,” diris la maljunulino, „por ke vi povu rifuĝi.”

Kiam ŝi diris tion, la viro estis ŝovanta pezan bierbarelon for de la sledo. Laborante pri tio li haltis, kvazaŭ ne povante decidi, ĉu li forĵetos la barelon. Sed fakte liaj pensoj okupiĝis pri io tutalia.

„Viro kaj ĉevalo, tute sendifektaj, por sia saviĝo ne bezonas oferi maljunan virinon al la lupoj,” li pensis. „Ekzistas certe alia rimedo por savi nin. Jes, kompreneble iu rimedo ekzistas. Mankas nur, ke mi ne sukcesas elpensi ĝin.”

Denove li ekŝovis la bierbarelon, sed subite li haltis kaj ekridegis.

La virino rigardis lin timiĝite kaj opiniis lin freneza, sed la viro el Hede priridis sin mem, ĉar li estis tiom stulta. Estis la plej simpla, kion oni povis elpensi por savi ĉiujn tri; li ne komprenis, ke ne pli frue li pensis pri tio.

„Aŭskultu nun bone, Malin,” li diris. „Estis brave de vi, ke vi volis doni vin mem al la lupoj. Sed tion vi ne bezonos fari, ĉar nun mi scias, kiel ni tri elsavos nin. Memoru bone, ke — kion ajn mi faros — vi restu trankvile sur la sledo kaj veturu al la vilaĝo. Tie vi veku la homojn kaj diru, ke mi sola kuŝas sur la glacio kun dek lupoj ĉirkaŭ mi, kaj petu al ili veni por helpi min.”

Nun la viro atendis, ĝis la lupoj estis tre proksimaj al la sledo. Tiam li ĵetis la grandan barelon sur la glacieron, saltis de la sledo kaj rampis sub la barelon.

Ĝi estis grandega barelo, kaj tiel farita, ke ĝi povis enhavi la tutan kristnasko-bieron. La lupoj alsaltis, mordis la ringojn kaj provis renversi ĝin, sed la barelo estis tro peza kaj staris tro firme. Ili ne povis kapti tiun, kiu kuŝis sub ĝi.

La viro el Hede sciis, ke li kuŝas sekura kaj li priridis la lupojn. Sed poste li serioziĝis.

„Tuj kiam mi denove staros antaŭ malfacilaĵoj,” li diris al si mem, „mi memoros pri ĉi tiu barelo. Mi memoros, ke mi ne bezonas fari malbonon, nek al mi mem, nek al aliaj homoj. Ĉiam ekzistas tria eliro, se oni nur sukcesas trovi ĝin.”

(el: La mirakla vojaĝo de Nils Holgersson, de S. Lagerlöf) Vane.

MONT-DANGERO.

Hies estis mallertega, sed ankaŭ fortega kiel urso, kun tre longaj haroj sur la kolosa kapo.

Lois estis lerta kaj fleksema, kaj havis blujn okulojn.

Ambaŭ estis mont-gvidistoj kaj loĝis en kabano, kiu staris en soleca valo, je alto de 1600 metroj.

Hies jam kuŝis sur la tabul-kuŝejo kaj duondormante li opiniis: „Fremdulojn ni bezonas, kiaj en „Salzburg” estas. Tiajn Anglojn kaj Amerikanojn. Tiam ni ricevus monon!”

Lois purigis terpom-ujon, pretigis brul-lignon kaj plenigis la noktlanpon per oleo. Poste li premis Hies-on al la muro kaj ekdormis kiel li.

Pasis proksimume kvarona horo, jen oni frapis. Komence hezite, poste pli forte. — Lois eksaltis kaj malfermis la pordon. Li vidis ravan knabinon, kiu, frotante la manojn enpaŝis kaj alparolis lin en fremda lingvo: „Ĉu vi estas la montgvidistoj?”

„Ollerreit!” respondis Lois, supozante la knabinon Anglino.

„Vi tuj prenu ŝnuregon kaj gvidu min al la pinto de Mountain. Mi volas vidi la sunleviĝon de sur la pinto!”

„Sed — eh —” opiniis Lois ridetante, „tio ne estas facila, sinjorina moŝto! Ĉar estas terura vetero. — Ne, tio ne eblas!”

La Anglino trankvile metis tricent ŝilingojn sur la tablon kaj diris: „Jen, ĉu vi volas? Alie mi iros sola!”

„Jes, jes,” rapidis Lois, prenante la monbiletojn. Tiam mi ja devas. Nu do, ollreit, ni iru!”

Post longa batalo en glacio kaj neĝo oni atingis la pinton. Ĝuste aperis la suno kaj kolorigis la ĉirkaŭantajn montojn kiel fajron, dum malsupre regis valnebuli. En sia troa entuziasmo la anglino subite prenis Lois-on kaj donis al li eĥantan kison. Lois, ne atendante ĉi tiun atakon, elglitis kaj ambaŭ falis kvin metrojn malsupren, laŭ la deklivo. Dum la falo Lois kaptis arbeton, dum la anglino pendis unu metron pli profunde sur radiko. Sed sub ili oscedis la profunda abismo. Jen, Lois vidis, kiel la radiko, ĉe kiu pendis la anglino, malfiksiĝas. Per unu mano li pli firme tenis sin je la arbo, por ekpreni per la alia mano la anglinon. Sed li aŭdis homon terure krii..... La anglino malaperis antaŭ lia rigardo. La arbo glitis el lia mano, ŝtono falis sur lian vizaĝon, li falis — pli profunden — tiam li sentis ion malmolan..... Li aŭdis super si Hies-on: „Vi stultulo, frenezulo. Ĉu tiu vangbato ankoraŭ ne

sufiĉas, ĉu vi opinias, ke mi lasas elŝiri ĉiujn miajn harojn? Ha.?”
— Lois ŝanceliĝis al la tablo, metis la fingron sur la platon kaj diris: „Ĉi tie ŝi metis tricent ŝilingojn! Estas plorinde! — Fine venas anglino en nian valon, kaj nun estas nur sonĝo.....”

St. Pölten (Aŭstr).

A. FEILBACHER JOSEFO.

ENIGMOJ.

a, a, a, a, a, n,
m, r, r, r, r, o,
o, o, o.

La vortoj signifas

1. vokalon; 2. nomon de esp. litero; 3. grupon; 4. akvomason; 5. maldolĉan.

e, e, e, f, f, g,
i, i, i, i, n, n,
o, o, o, t, t.

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale: 1. Devenon; 2. kontraŭdiri; 3. malgrandigi.

spišká Nová Ves (Ĉeh.)

J. HARGAŠ.

LA SOLVOJ EL NO. 2—3.



La premiojn gajnis: Francisko Flossmann, Košice (Ĉehosl.), N. Sindhwad, Brussel-Ukkel (Belg.), M. Ménot, Orléans (Franc.).

Premion pro verkaĵo laŭ la bildo en No. 2—3-gajnis: S. Kool, West-Graftdijk, (Ned.), S.ro Lechelle, Parizo (Franc.).

BONA AKCEPTO!

Dek tagojn post la apero de la **nova lernolibreto** (paĝoj 69, 64, 71) la sekvaj grupoj jam enkondukis ĝin: Krommenie, Heiloo, Gemert, Groningen, Amsterdam, Zaandam, Rotterdam. Krome la Brita Esp. Asocio mendis 100 ekz.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. En jenajn lokojn oni enkondukis „L.J.V.”: Egmond (Ned), Wormerveer (Ned), Helmond (Ned), Lottum (Ned), London (Angl.), Bourneville (Angl.), St. Pancras (Ned), Noord-Scharwoude (Ned), Aarschot (Belg).

2. En „De Proletarische Vrouw” kaj „Purmerender Courant” aperis, handlingve: „Junulgastejoj kaj Esperanto” el „La Juna Vivo” No 12(35).

VIVU LA MUZIKO (Ĉenkanto por 3 voĉoj).

① *malrapide* ②

1: A 5 . 4 3 2 1 | 7 1 7 $\hat{\circ}$ | 3 . 4 5 4 3 |

Vi - vu, vi - vu la mu - zi - ko! Vi - vu, vi - vu la

③

2 1 2 $\hat{\circ}$ | 1 1 . 4 | 5 6 5 $\hat{\circ}$ ||

mu - zi - ko! Vi - vu la mu - zi - ko!

Antverpeno (Belg.) trad. J. VAN SCHOOR.

ĜOJE DANCAS NI (Ĉenkanto por 3 voĉoj).

① *trankvile* C C C G

C: 1 5 i | 5 4 3 5 i | 5 5 i | 5 4 3 4 2 |

Ĝo - je dan - cas ni, ha, ha, ha, Ĝo - je kantas ni, la, la

C ② C a d G

\hat{i} \hat{i} \hat{i} | 1 3 2 1 | 1 3 2 1 | 1 1 5 5 |

la; la la la la la la la la la la la la

C ③ C a G⁷ C

\hat{i} o | 3 2 i o | 3 2 i o | 3 2 i 2 7 | \hat{i} ||

la la la la la la la la la la la.

trad. J. VAN SCHOOR.

ESPERANTISTA MARŜO.

Post paŝo paŝ', antaŭen marŝu ni
 Senlace, fratoj, rekte al la celo!
 Armeon nian estras harmoni',
 En koroj fid' al vojmontranta stelo.

Post paŝo paŝ, antaŭen marŝu ni,
 Standardo verda nin al venko gvidos!
 Ne plu timiga estas kalumni',
 Pri homoj stultaj ni elkore ridos.

Post paŝo paŝ, antaŭen marŝu ni,
 Sur lipoj brave sonu nova kanto!
 Al pura sent', al plena harmoni'
 Popolojn gvidas sole Esperanto.

Riga, Latvuj, 1936.

LUDMILA JEVSEJEVA.

LA MORTO DE LA PORKO.

„Panjo, rakontu ree kiel mortis nia maljuna porko, dum mi estis for al la foiro,” petis kamparano al sia edzino.

„Ho paĉo, mi jam trifoje rakontis al vi tiun historion!” mire respondis la virino. „Nun lasu la kortuŝan aferon. Ĝi plorigas vin.”

„Ĝuste pro tio mi deziras aŭdi ĝin. Estas polvo en mia okulo, eble la malpuraĵo forfluos per la larmoj!”

Parizo (Franc.)

LECHELLE.

SAVITA DE LA ELEKTRA LUMO.

Angla ŝipo, survoje al Ameriko, transportis leopardon, destinita por la zoologia ĝardeno en New York. Dumvojaĝe la besto fuĝis el sia kaĝo kaj ŝteliris en la kajuton de la telegrafisto. Li terure ektimis, vidante en la duonmallumo la ardantajn okulojn de la besto. Subite li memoris, ke la ĉasistoj per fajro ŝirmas sian bivakon kontraŭ rabobestoj. Kaj trafe maltrafe li abundege eklumigis sian ĉambreton per la elektra lumo. Blindigite pro la lumo la besto retiris sin. La telegrafisto rapide ĵetfermis la pordon kaj telefonis al la ferdeko por averti la ŝipanaron. Oni denove kaptis la beston kaj remetis ĝin en la kaĝon.

K. STAM.

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „Jarkolekton” de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.

LA VENĜO.

Romana imperiestra edzino ricevis de juvelisto falsajn juvelojn anstataŭ veraj. Pro tio ŝi postulis severan punon por la trompisto. La regnestro estis molkora homo, tamen li ne povis mildigi la koron de sia edzino. Sekve li kondamnis la krimulon je batalo kontraŭ sovaĝaj bestoj.

Akompanata de multaj korteganinoj ŝi iris al la punejo por ĝui la spektaklon.

La trompisto tremegante atendis sian kruelan sorton.

La kaĝo de la sovaĝaj bestoj malfermiĝis — kaj elvenis ŝafido, kiu saltetis al la viro kaj karesis lin!

La imperiestrino ne povis regi sian koleron, kaj furioze turnis sin al la edzo.

Ĉi lasta trankvile respondis: „Okazis justeco. Li trompis vin, kaj nun mi trompis lin!”

Parizo (Franc.)

LECHELLE.

LA KAMPARANO KAJ LA PORKO.

Iun tagon imperiestro Karlo V renkontis kamparanon kun porko survoje al la foiro. Sed la besto haltis obstine kaj faris eĉ ne unu paŝon. La posedanto forte batis ĝin, sed vane.

Multaj korteganoj, kiuj akompanis la imperiestron, provis malhelpi la krudemulon.

„Donu al mi rimedon, por ir-igi mian porkon!” diris la kamparano.

„Aŭskultu,” respondis Karlo, „tiru la beston ĉe la vosto, kaj ĝi certe iros antaŭen!”

„La kamparano plenumis la konsilon, kaj la porko iris antaŭen. La viro demetis sian ĉapon, kaj diris: „Dankon, kara sinjoro; oni povas konstati, ke vi multe rilatas kun porkoj!”

La sinjoroj korteganoj estis malkontentaj pri tio, sed Karlo ekridis kaj daŭrigis sian vojaĝon.

Wormer (Ned.)

K. STAM.

Prezo lernolibreto: Usono: 0,15 dol; **Aŭstrio:** 0,64; **Britujo:** 6 p.; **Belgujo:** 4 fr; **Ĉeĥoslovakujo:** 3,5 Kĉs; **Danujo:** 0,50 kr; **Francujo:** 2,5 fr; **Japanujo** 0,50 jap. jen; **Norvegujo:** 0,50 kr; **Polujo:** 0,75 zl; **Svedujo:** 0,50 kr; **Svisujo:** 0,4 sv. fr; **Argentino:** 0,50 pes.

LI NE VALORIS, KE LA SUNO BRILAS SUR LI.

Estis varme, varmege! La hundoj kuŝis sur malvarmeta loko, kun la lango el la buŝo, kaj revis pri la freŝa lageto, sed estis tro maldiligentaj iri tien. La sturnoj sidis oscedantaj sur la tegmento kaj pensis pri la ĉerizarbejo proksima, sed estis tro inertaj flugi tien.

Estis do tre varme!

„Johano, Johano!” vokis la urbestro el la fenestro. „Johano!” li vokis ankoraŭfoje, sed kiu ajn venis, ne Johano. „Fulmotondro! Kie estas la viraĉo?” murmuris furioze la urbestro, kaj malgraŭ la varmo li eniris la ĝardenon por serĉi Johanon.

Malantaŭe en la ĝardeno, en la malvarmeta ombro de nuksarbo, la urbestro trovis sian serviston, kviete dormanta.

„Tio estas efektiva ekzemplo de maldiligenteco!” kriis la urbestro, permane vekante sian serviston. „Ĉu vi ne hontas, dormi dum klara tago? Vi ne valoras, ke la suno brilas sur vi!”

„Tial mi ĝuste kuŝiĝis en la ombro”, respondis Johano, frotante la palpebrojn.

K. STAM.

Kia estis la vetero? Kiel fartis la hundoj? Kial la sturnoj pensis pri la ĉerizarbejoj? Ĉu ili ne povis flugi tien? El kio montriĝas, ke estis tre varme? Ĉu ankaŭ la urbestro estis ekstere? Kial la urbestro estis tiom furioza? Kien li iris por serĉi Johanon? Kio estis malantaŭe en la ĝardeno? Kiel fartis la servisto? Kiel la urbestro vekis la serviston? Kial la servisto ne valoris, ke la suno brilas sur li? Kial Johano kuŝiĝis en la ombro?

Tasko:

- I. Traduku la rakontojn en vian gepatran lingvon. Rakontu la enhavon per propraj vortoj.
- II. Lerne parkere „Esperantista Marŝo”.
- III. Lerne parkere kaj traduku jenajn proverbojn: Neleĝe akirita ne estas profita. — Kiu ĉe la vojo konstruas, tiun ĉiu instruas. — Rostita kolombeto ne flugos al buŝeto. — Kun vi kuniĝas, tia vi fariĝas. — Forĝu feron dum ĝi estas varmega. — Du militas, tria profitas. (Ekzercu la ludon sur paĝo 32, No. 2—3).
- IV. Faru verkaĵon laŭ unu el jenaj temoj: 1. Kion mi farus, se mi estus riĉa. 2. Revoj pri la estonto. 3. Vintraj plezuroj kaj malplezuroj.

Inter la sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni disdonos 2 premiojn. Ni atendas la verkaĵojn antaŭ 15 Decembro.

LA DEK SEPA LECIONO.

A. Daŭre studi — stud-**ad**-i; daŭre labori — laboradi; paroladi, kantadi, dancadi, dormadi, iradi, trinkadi, legadi, tiradi, revadi. Parolo — parol-**ad**-o, kanto — kantado, trinko — trinkado, skribo — skribado; promenado, laborado, legado, kalkulado, studado.

B. Lerni — lern-**em**-a, danki — dankema; forgesema, babilema, drinkema, batalema, aŭskultema, petolema, manĝema, kolerema, mensogema, kredema, timema, ŝtelema.


C. LA TIGRO, LA BRAMANO KAJ LA ŜAKALO.

Iun tagon **tigro** estis en kaptilo. **Vane** ĝi provis forkuri el la kaptilo, mordis la feraĵn stangojn kaj **blekegis** pro doloro kaj kolero. **Hazarde pasis** malriĉa Bramano.

„Ho, malfermu la kaĝon!” petegis la tigro.

„Ne, ne,” la Bramano respondis **kviete**, „mi certe ne faros; vi estas tro **danĝera!**”

„Ne, ne,” diris la tigro, „vi ne bezonas timi min! Mi **ĵuras**, ke mi ne kaptos vin. Kontraŭe, mi restos **dank-em**-a al vi, dum mia tuta vivo.”



Ĉar la tigro multe petegis kaj ĵuris, la **pia** Bramano sentis **kompaton**. Li malfermis la pordon de la kaptilo. **Tuj** la tigro elsaltis, kaptis la viron kaj kriis: „Stultulo, nun mi manĝos vin, ĉar pro mia longa restado en ĉi tiu mal-liber-ejo mi ege malsatas!”

La Bramano petegis al la tigo ne formanĝi lin, sed vane. Fine la besto diris al la Bramano: „Demandu al tri estaĵoj, ĉu mi ne rajtas formanĝi vin!”

Unue la Bramano demandis al **fig**-arbo, kion ĝi **opinias** pri la afero. La arbo respondis kviete: „Kial vi **kuraĝas plendi** pri la maldankemo de la tigo? Ĉu mi ne donas **ombron** al ĉiuj preterpasantoj? Kaj ĉu ili estas dankemaj? Ili **rompas** miajn **branĉojn** por nutri la bestojn! Do vi ne plendu. La mondo ja estas maldankema.”

Malĝoje la Bramano iris pluen, **ĝis kiam** li renkontis bovinon, kiu laboras en **muelejo** por **funkci**-igi akvo-radon. La Bramano rakontis la aferon al la bovino, sed ĉi tiu diris: „Vi estas stulta se vi atendas dankemon. Jen mi, dum **jaroj** mi donis multan lakton. Kaj **rekompence** la homoj nun postulas de mi ĉi tiun pezan laboron. Kaj ili donas **apenaŭ** sufiĉe da nutraĵo al mi por vivi.”

Tre **ĉagrene** la Bramano foriris. Poste li renkontis **ŝakalon**.

„Kio **okazis** al vi, sinjoro Bramano?” ĉi tiu demandis. „Vi **aspektas mal-gaje**”. La Bramano rakontis **ĉion**.

„Kia stranga historio!” rimarkis la ŝakalo. „Mi ankoraŭ ne komprenas. **Bonvolu** denove rakonti, sed pli **klare**.”

Denove la Bramano rakontis la historion, sed la ŝakalo ne komprenis.

„Mi kuniros kun vi al la tigo”, ĝi diris. „Eble mi povos helpi al vi”.

- a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn.
- b. Laŭtleĝu la lecionon.
- c. Traduku A, B, C en vian gepatran lingvon.
- d. Respondu al jenaj demandoj:

Kie estis la tigo? Kion faris la tigo? Kiu preteriris? Kion petegis la tigo? Ĉu la Bramano tuj malfermis la kaptilon? Kial li ne tuj malfermis la kaptilon? Kion diris la tigo? Kion sentis la Bramano fine? Kia estis la Bramano? Kion li faris? Kiu saltis el la kaĝo? Kiun kaptis la tigo? Kion ĝi diris? Kion petegis la Bramano? Kion la tigo fine diris? Al kiu la Bramano iris unue? Kion li demandis al la figarbo? Kion respondis la arbo? Kion donas la figarbo al la homoj? Ĉu la homoj estas dankemaj? Kiun renkontis la Bramano poste? Kie estis la bovino? Kion ĝi diris al la Bramano? Kion la bovino donis al la homoj? Ĉu ili estis dankemaj? Kion diris la ŝakalo al la Bramano? Ĉu la ŝakalo tuj komprenis la historion? Kion la ŝakalo fine diris?

LA DEK OKA LECIONO.

A. LA TIGRO, LA BRAMANO KAJ LA ŜAKALO. (daŭrigo).

„Vi tre longe forrestis!” diris la tigro. „Mi ne plu atentos, sed tuj komencos mian tagmanĝon.”

„Vian tagmanĝon” balbutis la Bramano, kaj li tremegis pro timo.

„Atendu ankoraŭ kvin minutojn!” li petegis. „Mi ankoraŭ volas rakonti la aferon al la ŝakalo.” La tigro konsentis. Kaj denove la Bramano komencis rakonti. Por gajni tempon li rakontis tre detale.


„Ho, mia cerbo!” plendis la ŝakalo. „Mi ne povas kompreni tian komplikan historion. Kiel okazis? Vi estis en la kaptilo kaj la tigro hazarde preteriris.....”

„Ho, ho,” ĝin interrompis la tigro. „Mi estis en la kaptilo!”

„Nature, nature,” kriis la ŝakalo. „Jes, jes, mi komprenas. Mi estis en la kaĝo — ne, tiel ne. Ho, ho, kiel malfacile! Jen — la tigro sidis en la Bramano, kaj la kaptilo hazarde preteriris — ne, ne tiel. Mi certe neniam komprenos. Komencu do vian tagmanĝon!”

„Ne, ne,” la tigro kriis kolere, „nun vi devas kompreni! Mi volas! Mi klarigos al vi. Jen, mi estas la tigro.”

„Jes, sinjoro tigro!”



„Kaj tio estas la kaptilo.”

„Jes, sinjoro tigro.”

„Kaj mi estas en la kaptilo. Ĉu vi komprenas?”

„Ne — ne, sinjoro tigro!”

El: „Zonneschijn” (7de stukje), C. A. J. v. Dishoeck. N.V. Bussum.

„Ho, **diable!**” kriis la tigro senpacience.

„Pardonu sinjoro tigro, sed kiel vi estis en tiu kaptilo”.

„Kiel, kiel mi estis en tiu kaptilo? Nu, **ordinare!**”

„Dio helpu min! Mia **malfeliĉa** kapo! Pardonu, sinjoro tigro, sed kiel estas ordinare?”

Tiam la tigro perdis la paciencon. Ĝi furioze ensaltis la kaptilon. Kaj kriis: „Tiel estas ordinare! Ĉu vi nun komprenas?”

„Bonege,” ridis la ŝakalo, kaj ĝi ĵetfermis la pordon, „bonege, sinjoro tigro. Nun la afero **statas** precize kiel je la komenco de la rakonto.

B. Mur-papero, legolibro, patrolando, infanludo, **lip**-haroj, **ĝarden**-domo, **gas-fabrika**, **leter**-papero, **jar**-libro, te-glaso, dorm-ĉambro, Esperanto-**klubo**, akvo-falo, **adres**-libro, dombesto, Esperanto-kongreso, ĝardenbenko, cigarfabriko, ĝardenseĝo, florĝardeno, **nokto**-birdo, florpoto, dompordo, ĝardenpordo, matenmanĝo, **flug**-maŝino, **kap**doloro, manlaboro, labortago, **fest**manĝo, festotago, ludmono, **trink**mono, poŝtkarto, **klas**ĉambro, ludkaso, fruktarbo, kaslibro, tagmezo, noktomezo, virkato, laborĉambro, paperfabriko, **film**-fabriko, buterpano, fruktarbo.

- a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn.
- b. Laŭtleĝu la lecionon.
- c. Kopiu kaj traduku A kaj B en vian kajeron.
- d. Rakontu la enhavon de A per propraj vortoj.
- e. Ludu multfoje jenan ludon:

Unu el la societo ĵetas pilkon al alia persono, nomante la unuan vorton de kunmetita vorto. Tiu, al kiu li ĵetis la pilkon, tuj diras alian vorton, kiu kompletigas la diritan. Ekz.: fingro — ringo, nazo — tuko, ktp. Kiu en tri sekundoj ne trovis konvenan vorton, donu garantiaĵon al la gvidanto.

KIEL NI PROPAGANDOS!

„La Juna Vivo” intencas grandskale reklami Esperanton inter la junularo kaj infanoj. S.ro Justo Estan, hispana Esperantisto, kiu bicikle travojaĝis multajn landojn, kaj tre alloge povas rakonti pri siaj spertoj, aŭtomobile vizitos lernejojn, kie li prezentos lumbildojn. Fine Kool prizorgos la tradukadon. Plue S.ro Estan donos prov-lecionon laŭ la unua leciono el: „La Juna Vivo, Internacia Esperanta Lernolibreto”. Ĉi tiu lernolibreto, kun bildoj, kantoj kaj ludoj estas certa la plej malkara lernolibreto, ĝis nun aperinta. Ĝi kostas nur 20 cendojn. (Vidu plue paĝon 61, 64, 71). — Grupoj, kiuj deziras organizi propagandesperon kun S.ro Estan, skribu al la red. de „La Juna Vivo”.

La kostoj estas tre malaltaj!

KORESPONDADRESOJ.

Al niaj abonantoj: Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol 2 linioj (por ĉiu plia linio oni aldonu 0,30 gld.).

Argentino: 48 jara radio-inĝ. deziras korespondadon por nova hispanlingva revuo „Internacia” — H. Ceretti, 9 de Julio 3301, Rosario.

Aŭstrio: Fervojisto dez. interŝ. poŝtkartojn el Letlando, Finnlando, Japanujo, k. Ĉinujo. Fr. Schmied, Mautern 55, Steiermark.

Ĉeĥoslovakujo: S.ro S. Dudaš, Bohdanovce u Koïc, 17 jara stud. dez. kor. pri ĉiuj temoj, interŝ. poŝtm., il. poŝtk. Certe respondos.

Ĉeĥoslovakujo: Mi dez. kor. kun gesamideanoj el: Sovetio, Japanujo, Ĉinujo, S. Ameriko, pri ĉ.t. Sro C. Libosvár, Hluk, Ĉ 202.

Ĉeĥoslovakujo: Mi dez. kor. plej volonte kun studentoj aŭ profesoroj pri la latina lingvo kaj pri variaj problemoj de lerneja sistemo, klasika filologio, ktp. Certa resp. latine aŭ esperante. Rud. Mertlík, studento, Hradec, Králové. Rašinovo gymnasium.

Ĉeĥoslovakujo: Sendu al mi 50 aŭ 100 pm. kontraŭ la sama kvanto el Hungarujo kaj CSR. J. Szerémi, Zeleznik, P. Révüca.

Finnlando: 12 jara knabo dez. kor. per let., poŝtk. il., interŝ. pm. kun gemikoj el ĉiuj landoj. Yrjö Hiltunen. Kouvola.

Japanujo: 14 jara liceano, dez. kor. kun matematikŝatantoj. Mitsuo Gotos, Shinmaschi, Kuwanacho, Mieken.

Japanujo: Iwao Hirata, ĉe Asahi Taksio, Sakaimaĉi-89, Otara, dez. kor. per bildkartoj kun eksterlandanoj.

Nederlando: Esperanto-klubo kun dek geanoj deziras grupe korespondi pri ĉiuj temoj, k.ĉ.l. S.ro J. Kars, Meent 15, Leerdam.

Nederlando: Du sinjoroj dez. korespondadon kun samideanoj el ĉiuj landoj. S.ro Baljet, Zwaagstraat 9, Nieuwendam.

Nederlando: S.ro Joh. v. d. Klip, v. Marlestraat 1, Deventer, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Respondo garantiata.

Nederlando: 16 jara knabo dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. kun samaĝaj knaboj el ĉiuj landoj. Resp. certa. J. Olst, Rijdsdijkstr. 5, Sliedrecht.

Norvegujo: Norvega instruisto en popol-lernejo dez. kor. kun gekoleganoj. Sendu foton. Certa resp. T. K. Steinsland, Laudal, Krs. Sand.

Polujo: Esp. lab. sekc. dez. kor. k.c.l. kie ekzistas oraj k.karbminejoj, kun konantoj de minejaj kondiĉoj. Fr. Denkowski, Janów k.Katowic, Planty 3.

Portugalujo: José Simoes, str. de Lisboa 22, Angra do Heroismo, Acores, dez. kor. kun ges.anoj de ĉie.

Svedujo: 22 jara junulo deziras koresponadi kun ĉiuj landoj. Bertil Nilsson, Brännkyrkagatan 153 I, V, Stokholmo.

Svedujo: 15 jara knabo dez. kor. kun ĉ.l. Li certe resp. per p.k. il. el sia loĝloko. B. Löfqvist, Uddensgränd 4, Visby.

Svedujo: Kelkaj 19-25 jaraj junuloj dez. kor. pri ĉiu temo. Resp. certa. S. Erik Karlsson, Olastorp, Duvholt.

Ĉeĥoslovakujo: 23 jara oficisto dez. interŝ. poŝtkartojn el ĉiuj landoj. Hala, Hluk 614.

Nederlando: Junulo dez. kor. kun ĉiuj landoj. J. v. Voorden, Zuiderweg 228 Z.O. Beemster, post Purmerend.

Francujo: S.ro Miguière dez. interŝ. let., poŝtk., ktp. de lernejo al lernejo (15 geknaboj) en unu koverto. Lernejo, 31 Av. de la République Igny (G.).

Nederlando: J. C. Nieuwenhuys, Prinses Julianaweg 93, Utrecht, dez. kor. kun eksterl.k.doj pri la Diesel Elektro-Vagonaroj ĉe la fervojo.

Francujo: S.ro F. Depreux, 23 jara, kaj 10 amikoj, dez. kor. pri ĉ.t. kun tuta Eŭropo kaj Ameriko, interŝ. poŝtm. 266 Rue St. Quentin, Caudry (Nord).



Infangrupo en Kwadijk (Ned) ricevis la unuan premion en konkurso kun ornamitaj ĉaroj. Ĝi faris bonegan propagandon por Esperanto. Volonte la infanoj de tiu grupo korespondos kun eksterlandaj infanoj. Skribu al: F.ino N. Garms No. 24, Kwadijk.

ANTAŬPAROLO.

Jen nova instrumetodo por Esperanto.

Ĝi diferencas de aliaj metodoj, ĉar ĝi estas bazita sur **la moderna pedagogia principo: Lernado per imitado.**

Pro tio ĝi estas destinita precipe por infanoj, kaj por plenkreskuloj, kiuj ricevis nur la instruon en elementa lernejo.

La metodo estas frukto de la sperto. Kiam mi komencis instrui Esperanton, mi uzis ĉefe la tiel nomatan gramatikan metodon, sed la rezultato estis malĝojiga. La lernantoj fervore komencis la studadon, sed post kelkaj monatoj tedis ilin la ĉiamaj traduk-ekzercoj, kaj kiam mi finfine pritraktis la partecojn, la lernantoj unu post alia forrestis. Mi preparolis la aferon kun kolegoj-geinstruistoj, kaj ili plendis pri la samaj spertoj.

Pro tio mi elpensis alian metodon. Mi ne plu klopodis instrui la tutan gramatikon per traduk-ekzercoj, sed grade instrui ĝin per simpla kaj interesa legaĵo, ludoj, kantoj, enigmoj ktp. Kaj vere, mi sukcesis. La rezultato estis multe pli kontentiga ol antaŭe.

Poste mi konstruis tutan metodon laŭ la sama principo, kaj ellaboris ĝin

en „La Juna Vivo”, monata organo por gejunuloj kaj komencantoj. Kaj nun? Aplikante nur la nepre necesan parton de la gramatiko, kaj ellasante ĉion, kion la lernantoj preskaŭ neniam bezonas, mi spertas, ke la lernado estas multe pli agrabla ol antaŭe. Nun la gelernantoj ne plu enuas kaj ili faras sian taskon kun plezuro. Kaj multaj kolegoj, kiuj uzas: „La Juna Vivo” en siaj kursoj, skribis al mi la samon: „La rezultatoj estas bonaj kaj — la lernantoj restas.”

Mi forte esperas, ke mi per mia simpla laboro kontribuos iom al nia granda celo: la disvastigado de Esperanto. LA VERKISTINO.

Por ke			
Ĉiu Esperantisto povu studi			
la VERKOJN de			
D.ro L. L. ZAMENHOF			
Ni provizore donas 20 %-rabaton.			
		mal-	nova
		prezo	(en guld.)
Fundamento de Esperanto			
(5-lingva, broŝ)	0,75	0,60	
Fundamenta Krestomatio			
(broŝ.)	1,80	1,44	
Lingvaj Respondoj	0,90	0,72	
Proverbaro Esperanta	0,90	0,72	
Fabeloj de Andersen			
I, II, III, ĉiu volumo	1,10	0,88	
Georgo Dandin	0,50	0,40	
Hamleto	0,75	0,60	
Ifigenio en Taŭrido	0,90	0,72	
La rabeno de Baharah ...	0,60	0,48	
La rabistoj	1,10	0,88	
La revizoro	0,90	0,72	
Marta	1,80	1,44	
La prezoj estas afrankitaj			
(Vidu ankaŭ la libroliston en la			
Aŭgusta-Septembra No.).			
			SKRIBA KURSO
			por A. kaj B.
			(nur por holandlingvanoj).
			Tre detala B-kurso. Gvidanto
			Simon Aarse.
			Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandi-
			dato sukcesis.
			La Verda Stelo, Radioweg 45,
			Amsterdam-O.
			PASO POST PASO.
			Een volledige Esperanto-leergang
			door
			J. W. Minke en F. Boom-de Vries
			1ste deeltje (150 pag.) f 0,75
			2de deeltje (208 pag.) f 0,95
			Verschenen bij:
			N.V. Uitgevers Mij.
			C. A. J. van Dishoeck
			Verkrijgbaar bij de redactie van
			„La Juna Vivo”.
			(en bij de erkende boekhandelaren).
			SPECIMENARO
			de pli ol 40 diversaj Esperanto-presaj
			ĵoj afrankite por hgld 0.12½ (ekster-
			landen por unu respondkupono)
			H-E-O SOESTERBERG
			Postkonto 88015

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan libro-liston!!).